
# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-24 n-ro 365

# Oksitocino povas intensigi socian timon




Aŭstralio: la aborigenaj infanoj estas viktimoj de malhumanaj ekscesoj en malliberejoj

Mnangagwa promesis sin dediĉi al disvolvado de ekonomio

Salo forpelas gravajn intestajn bakteriojn

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopiniajn kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus Open Source Desktop Publishing

Aŭstralio: la aborigenaj infanoj estas viktimoj de malhumanaj ekscesoj en malliberejoj
*«Nacia honto» p. 03*

Koalicio gvidata de Saud-Arabio decidis remalfermi Sanaan flughavenon
*Remalfermo de la haveno Hudaydah kaj Sanaa flughaveno p. 04*

Libana ĉefministro HARIRI decidis prokrasti sian rezignon
*Laŭ la peto de prezidento Michel AOUN p. 04*

MNANGAGWA promesis sin dediĉi al disvolvado de ekonomio
*Nova prezidento de Zimbabvo p. 05*

Sirio bonvenigas komunan deklaron de Rusio, Turkio kaj Irano
*Gravaj rezultoj p. 05*

Oksitocino povas intensigi socian timon
*Influas la interpersonajn spertojn same en pozitiva kiel ankaŭ en negativa sencoj p. 06*

Salo forpelas gravajn intestajn bakteriojn
*La tiel nomataj laktobaciloj, malaltiĝas pro tro da salo p. 07*

Hodiaŭe
*Arundhati ROY; Laurence STERNE; kaj Raĝastano p. 08*

Fidilalao HENRIEL: retradio ĉiam utilas por Afriko
*Aminda Radio Esperanto p. 09*

# Aŭstralio: la aborigenaj infanoj estas viktimoj de malhumanaj ekscesoj en malliberejoj

La Reĝa komisiono taskita pri studado de la karcera sistemo de la infanoj en Aŭstralio, kvalifikas kiel «nacian honton» la vivkondiĉojn de la neplenaĝulaj deliktuloj en Norda Teritorio. En 200-paĝa nerefutebla raporto, al kiu partoprenis pli ol 400 atestantoj, la enketistoj priskribas malhumanajn traktadojn, kaj raportas misproporcian ĉeeston de aborigenaj infanoj enkarcerigitaj en tiuj malliberejoj de Nordo. Ili aparte petas fermadon de la centro de *Don Dale*, kie la kondiĉoj de enkarcerigo estas aparte ŝokaj.




En nerefutebla raporto, la enketistoj de la reĝa komisiono rakontas, ke la neplenaĝuloj estas submetataj al fizikaj ekscesoj, kuraĝigitaj aŭ pagitaj por plenumi humiligajn agojn, kaj estas senigitaj je siaj bazaj rajtoj, kiel nutraĵo, akvo aŭ uzado de necesejoj.

La raporto mallaŭdas la maltaŭgan uzadon de izoliteco, kiu estas «fonto de suferoj ĉe multaj junuloj», kaj estigas «daŭrajn psikologiajn difektaĵojn». La komisiono emfazas ankaŭ «la ŝokajn kaj sistemajn misfunkciadojn», kiuj okazis «dum multaj jaroj», kaj «konataj en la plej altaj niveloj».

**La aborigenaj infanoj estas plimulto en la malliberejoj**

Tiu ĉi raporto akuzas la registaron de la Teritorio, ke ĝi nenion faras por preventi la deliktecon de la junaj Aborigenoj, kiuj reprezentas tri kvaronojn el la enkarcerigitaj neplenaĝuloj. Ĝi ankaŭ efektivigis persekutan malhumanan politikon, kiu kostas po 37 milionojn da dolaroj jare, prefere al politiko de disvolviĝo, kiu kostus kvinoble malpli, laŭ la komisiono.

La aborigenaj infanoj havas dudek-kvaroble pli da malbonŝanco frekventi malliberejon ol la aliaj infanoj, en kunteksto de klerigaj mankoj, alta mallaboreco kaj toksomanio, laŭ Internacia Amnestio.

La komisiono postulas fermon de la centro de *Don Dale*, aparte kritikata pro ĝiaj vivkondiĉoj de detenado, kaj reviziadon de la justico pri infanoj de Norda teritorio, inkluzive la malpermeson enkarcerigi malpli ol 14-jarajn junulojn.

**La malkaŝoj de la televidkanalo ABC**

Danke al enketo de la televidkanalo ABC, la Aŭstralianoj malkovris la teruran realecon de la malliberejo *Don Dale*. En 2016, ABC elsendis videojn filmitajn de la internaj kameraoj, montrantajn infanojn aĝajn je 10 ĝis 17-jaraj, batatajn de la provosoj, malvestitajn, kelkafoje katenitajn dum pluraj horoj ĉe seĝo, kun kapuĉo sur la kapo.

La konkludoj estas «abomenaj», reagis la federala registaro, promesante labori kun la loka registaro, por efektivigi la rekomendojn de la raporto.

La aborigenaj asocioj deklaris, ke la raporto nur mencias problemojn konatajn de antaŭ longa tempo.

Neniam Milito Inter Ni

## Koalicio gvidata de Saud-Arabio decidis remalfermi Sanaan flughavenon

Saud-arabia novaĵ-agentejo raportis, ke la koalicio gvidata de Saud-Arabio merkrede [22 nov 2017] anoncis la remalfermon de la haveno *Hudaydah* kaj *Sanaa* flughaveno.




La koalicio portempe fermis ĉiujn terajn, aerajn kaj marnajn havenojn de Jemeno en la komenco de tiu ĉi monato, post kiam la Sauda-arabia aerarmeo interkaptis misilon pafitan el Jemeno al Riado. La koalicio akuzis Iranon pri kontrabando de misilo tra la havenoj de Jemeno.

La haveno *Hudaydah* kaj *Sanaa* flughaveno estas denove malfermitaj por ricevi urĝajn humanitarajn kaj helpajn materialojn.

Samtempe, la koalicio refoje vokis la Unuiĝintajn Naciojn urĝe sendi specialistan teamon por reekzameni kaj plibonigi la inspektan kaj kontrolan mekanismon de la UN.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

## Libana ĉefministro HARIRI decidis prokrasti sian rezignon

Libana ĉefministro Saad AL-HARIRI diris merkrede [22 nov 2017], ke laŭ la peto de prezidento Michel AOUN, li decidis prokrasti sian rezignon pri ĉefministreco.



HARIRI diris al raportistoj tiutage post nepublika kunveno kun prezidento AOUN, ke li prezentis sian rezignon al prezidento, kaj ĉi lasta petis lin prokrasti la rezignon por fari sufiĉan diskuton pri la kaŭzo de la rezigno kaj rilataj politikaj faktoroj.

Tiutage en la ĉefurbo Bejruto, HARIRI ĉeestis militan paradon okaze de la Sendependeca Tago kune kun prezidento AOUN kaj parlamenta prezidanto Nabih BERRI.

AOUN faris televidan paroladon en vespero antaŭ la Sendependeca Tago, dirante, ke fronte al la nuna situacio, Libano devas protekti nacian unuecon kaj stabilecon, eviti internan konflikton kaj rifuzi intervenon de eksteraj fortoj.

Yu
Ĉina Radio Internacia

## MNANGAGWA promesis sin dediĉi al disvolvado de ekonomio

Emmerson MNANGAGWA merkrede [22 nov 2017] revenis al sia lando kaj faris publikan paroladon en la ĉefurbo Hararo, promesante sin dediĉi al disvolvado de la ekonomio.




MNANGAGWA diris, ke li flugis el Zimbabvo al Sud-Afriko tuj post kiam li estis eksigita el la posteno de vicprezidento kaj lia sekureco estis minacata.

Li diris, ke Zimbabvo bezonas subtenon de la internacia komunumo kaj siajn proprajn klopodojn por revigligi la nunan malbonan ekonomion. Li vokis al ĉiuj zimbabvanoj unuiĝi kaj promesis, ke li klopodos por disvolvi la ekonomion kaj krei pli da laborŝancoj.

MNANGAGWA estis nomunita de la reganta partio kiel nova prezidento de Zimbabvo.

Adaptite el
Ĉina Radio Internacia

---

## Sirio bonvenigas komunan deklaron de Rusio, Turkio kaj Irano

La Siria Ministerio de Eksterlandaj Aferoj merkrede [22 nov 2017] publikigis deklaron, bonvenigantan la komunan deklaron subskribitan de Rusio, Turkio kaj Irano en tiu tago.




La ministerio diris en sia deklaro, ke la Siria registaro bonvenigas la komunan deklaron de la tri landoj pro sia subteno al ĉiuj politikaj klopodoj por respekto al la suvereneco, sendependeco kaj teritoria integreco de Sirio kaj haltigo de ĉiuj sangaj konfliktoj en la lando.

La deklaro esprimas la opinion, ke la intertraktado de Rusio, Turkio kaj Irano akiris gravajn rezultojn. La tri partioj venis en akordon pri batalo kontraŭ terorismo, fundamentaj principoj de politika procezo, nacia dialogo en Sirio, konstituciaj klaŭzoj kaj parlamenta elekto.

Merkrede en la rusa urbo *Soĉi* kunvenis prezidentoj de Rusio, Turkio kaj Irano. Ili interŝanĝis opiniojn pri plej freŝa disvolviĝo kaj solvo de la Siria demando kaj subskribis la komunan deklaron.

Yu
Ĉina Radio Internacia




# Oksitocino povas intensigi socian timon

Oksitocino, nomata ankaŭ kiel hormono de amo, influas la interpersonajn spertojn same en pozitiva kiel ankaŭ en negativa sencoj. Ĝi povas do kontribui al firmigo de la sociaj ligoj, kiel ankaŭ instigi al izoliĝo.

Ĝis nun oni asertis, ke oksitocino influas ĉefe la intimigon de la ligoj inter la patrino kaj la infano, inter partneroj, amikoj aŭ eĉ inter fremdaj homoj. Laŭ la esploroj de sciencistoj el la Kalifornia Universitato en *Davis* rezultas tamen, ke oksitocino intensigas sole la signifon de la sociaj spertoj. Ĝi povas favori kreiĝon de ligoj (pro pozitivaj spertoj) aŭ ĉe aliaj personoj intensigi socian timon (pro negativaj spertoj). Tio dependas de ĝia influo je konkreta cerboparto.

En esploroj pri musoj specialistoj elmontris, ke femaloj de ronĝuloj spertintaj streson dum sociaj interagoj poste evitis kontakton kun novaj musoj. Post la apliko de medikamento blokinta la efikadon de oksitocino ili ĉesis timi kaj senprobleme kontaktis aliajn musojn. Similajn rezultojn oni akiris en pli frua ekzamenado, en kiu estis rimarkite, ke la socia streso stimulas la produktadon de oksitocino kaj stresitaj musaj femaloj ricevantaj pernaze la hormonodozon retiriĝas el la sociaj kontaktoj.

La esploristoj malkovris, ke oksitocino povas influi du regionojn de la cerbo. Unu estas ligita kun la kontrolado de timo kaj laŭ la angla siglo estas difinata BNST, la alia estas „*nucleus accumbens*”, ligita kun la funkciado de premsistemo. La blokita efikado de la hormono en la regiono BNST kondukas al mildigo de la socia timo ĉe stresitaj animaloj. La kompreno kiamaniere tio funkcias ĉe musoj liveras novajn ideojn pri apliko de medikamentoj blokantaj oksitocinon en la terapio de la socia timo, kio ankaŭ povas evidentiĝi utila en la prilaborado de novaj kuracmetodoj kaze de deprimo aŭ la sociaj fobioj.

Pola Retradio

# Salo forpelas gravajn intestajn bakteriojn

Salo estas grava konsistero de nia nutraĵo. Ĉar ĝi influas ankaŭ la gustosenton, plej multaj homoj manĝas tro da ĝi. Tio efikas negative al bakterioj en la intesto, kaj al la imunsistemo, kiel esploristoj nun de nelonge scias.



Tro da salo en la manĝaĵo estas malsana. Ĝi povas akceli pli altan sangopremon kaj povas plialtigi la riskon malsaniĝi pro diabeto. Kion salo kaŭzas en la intesto kaj kiun influon ĝi havas por la imunsistemo, tion germanaj esploristoj nun testis.

Montriĝis ke la nombro de certaj laktacidaj bakterioj, la tiel nomataj laktobaciloj, malaltiĝis pro tro da salo en la intesto de la bestoj, kio siavice efikis al certa speco de imunĉeloj, nome la Th17-helpoĉeloj, kiujn oni konsideras respondecaj por aŭtoimunaj malsanoj, kiel ekzemple multobla sklerozo.

La esploristoj sekve testis kiel efikas la dono de probiotaj laktobaciloj al saloriĉa nutraĵo. Montriĝis ke malaltiĝis la nombro de Th17-helpoĉeloj kaj samtempe la sangopremo de la bestoj. Krome pliboniĝis la neŭrologiaj simptomoj kiuj estis observataj ĉe muso kun malsanmodelo por la multobla sklerozo.

Apud la esploroj ĉe musoj la esploristoj kontrolis la bakterian komunumon en la digesta sistemo de 12 sanaj homoj kiuj dum 14 tagoj ricevis ĉiutage po 6 kromajn gramojn da salo. Ĉar la testpersonoj daŭrigis manĝi kiel kutime, ili tiel duobligis sian ĉiutagan konsumon de salo. Ankaŭ ĉe tiuj homaj testantoj la intestaj bakterioj de la specio laktobacilo reagis senteme. Plej multaj el ili post 14 tagoj kun plialtigita konsumo de salo ne plu estis troveblaj. Samtempe plialtiĝis la sangopremo kaj la nombro de Th17-helpoĉeloj en la sango.

La esploristoj povis montri per tiuj rezultoj, ke la mikrobiomo, do la konsisto de la bakterioj en la intesto, estas grava faktoro por malsanoj kiuj estas influataj de salo. La esploristoj vidas terapian potencialon en laktobacilaj probiotaĵoj. La terapia efikeco de laktobaciloj, kiuj troviĝas precipe en fermentitaj manĝaĵoj kiel acida brasiko, jogurto kaj fromaĝo, per tiuj rezultoj tamen ankoraŭ ne estas pruvita. Ĉu oni povus kuraci multoblan sklerozon kaj altan sangopremon vere per adaptitaj probiotaĵoj, tio devas esti klarigita per pluaj studoj.

Esperanta Retradio



## Arundhati ROY

**Arundhati ROY naskiĝinta ja la 24-a de novembro 1961 estas barata verkistino kaj alimondisma aktivulino.**

**En Esperanto aperis: *Parolado en Monda Socia Forumo, 2003*.**

**Vikipedio**

---

## Laurence STERNE



**Laurence STERNE (naskiĝis la 24-an de novembro, 1713, mortis la 18-an de marto, 1768) estis angla verkisto.**

**En Esperanto aperis: *La vivo kaj la opinioj de Tristram Shandy, sinjoro*.**

**Vikipedio**

---



## Bildo de la tago

**Virino en *Bundi*, Raĝastano.**

**Vikipedio**

# Fidilalao HENRIEL: retradio ĉiam utilas por Afriko

**[Demando] Vi estas konata kiel profesia instruisto, unu el la veteranaj esperantistoj en Madakasgaro, redaktisto de gazeto, verkisto kaj profesia e-isto kadre de la projekto Esperanto Plus, kaj antaŭ ne longe vi fondis la retradion Aminda. Ĉu vi povas mallonge prezenti tiun novan iniciaton al ni?**

[Respondo] Ĉio fontis el mia deziro montri al nia samideanaro, ke Esperanto estas ne nur hobio, ke ĝi povas esti io serioza. Plie, mi pensis ke se mi starigos retradion, ĝi helpos min diskonigi kaj reklami pri miaj aktivaĵoj, i.a. EP, *Les Amis* de Wangari MAATHAI, Nomad'Kurso…, al tiom da gesamideanoj tra la tuta mondo. Mia eta scio pri komputila umado helpis min aranĝi la teknikajn flankojn de la radio, kaj kun helpo de E-amiko el Belgio mi povis aĉeti mikrofonon kaj [kapaŭdilan] kaskon. Samklubanoj kvankam ankoraŭ hezitemaj… partoprenas en la radio. Certe mi farus multon per vera radio, sed tio ja havas multajn postulojn kaj mi iel devis rezigni. Aminda Radio Esperanto (ARE) celas la tutmondan esperantistaron por informi ĝin pri Madagaskaro kaj pri Esperanto en tiu lando, pri diversaj projektoj rilate Esperanton. Sed ĝi celas ankaŭ kunlabori kun aliaj e-istoj precipe en Afriko por diskonigi la afrikan movadon.

**[D] Kun la naskiĝo de ARE vi sendube travivas novan sperton, ĉu vi povas diri kiel organiziĝas la elsenda laboro? Kio estas la avantaĝoj kaj la malavantaĝoj ligitaj al retradio?**

[R] Jes, temas pri nova sperto por mi ne nur el la kampo de komunikado sed ankaŭ el tiu de edukado [klerigado]. ARE estas teama laboro en kiu mi trejnas la gejunulojn pri la arto paroli en mikrofonon por esti aŭdataj… tra la vasta mondo! Mi mem devas zorgi pri la kolektado de la tekstenhavoj, tajpi kaj ilin printi. Poste, ĉiu devas legi kaj relegi plurfoje sian tekston antaŭ ol venos la provregistrado. La studio estas en mia ĉambro, kie kutime okazas niaj lingvokursoj. Ni faras provan sonregistradon kaj laŭ tio mi alĝustigas la nivelon de la mikrofono. Ekz., por registri unuhoran podkastaĵon necesas preskaŭ deko da horoj kaj ankaŭ oni devas okupiĝi pri la flego kaj plibonigo de la registritaj sonoj antaŭ ol alŝuti ilin. Nun mi scias nur pri la podkasta radio. Oni povas diri ke pli simplas elsendi per tiu kanalo ĉar la ĉefa teknika laboro konsistas nur el la sonregistrado. Por la aŭskultantaro, la retradio donas liberan eblon, kaj granda avantaĝo estas la ebleco reaŭskulti

podkastaĵojn iam ajn kaj kie ajn.

**[D] Ĉu vi havis la eblon aŭskulti aliajn podkastajn programojn aŭ similajn projektojn, kiuj ankaŭ elsendas rete? Se jes, kiel vi aprezas tiun ĉi retradian projekton?**



[R] Mi jam provis aŭskulti Esperante la radion Vatikano kaj tre ŝatas la prononcmanieron de la tieaj deĵorantoj. Mi iom ankaŭ aŭskultis Muzaiko, sed la ĉefa problemo en Madagaskaro estas la retkonekta kosto. Kiam oni ekzemple vizitas publikan retkafejon, pli urĝas okupiĝi pri retmesaĝoj, elŝutado de bezonataj dokumentoj, alŝuto de podkastaĵoj ktp. Tial ne plu eblas starigi ekzemple blogilon por akompani ARE. Ĉiuokaze, al mi ŝajnas, ke retradio ĉiam utilas por nia komunumo ĉar ĝi respondas al la deziro de la nuntempa junularo en tio, ke estas pli facile kaj simple alirebla por ili.

**[D] Vi estas granda Esperantoaganto en Afriko, kiu estas via diagnozo pri la nuntempa stato de la kontinenta movado laŭ vi, kaj kiujn sugestojn vi tamen proponas por antaŭenigi la movadon en Afriko?**

[R] Mi mem ne taksas min granda Esperanto-aganto. Afriko estas viktimo de sia propra grandeco. Estante insulano, mi scias preskaŭ nenion pri la situacio en la kontinenta Afriko. En 1996, en Prago, *Tabor* kaj Berlino, mi renkontis kelkajn afrikanojn kaj interŝanĝis ideojn kun ili, do mia kono pri miaj afrikaj gesamideanoj limiĝis al tio. Certe la lingvo progresas en kelkaj landoj kiel Togolando, sed daŭre malmultas la Esperanto-parolantoj en Afriko. Laŭ mia opinio, la ideo pri ununura Centra Oficejo por la tuta Afriko ne vere taŭgas pro la vasteco de nia kontinento. Kaj la Esperanto-komunumo, krom la instruado de la lingvo al afrikanoj, devas ankaŭ helpi ilin akiri per la lingvo scion teknikan kaj teknologian por disvolviĝo de la kontinento. La plena uzado de Esperanto en nia ĉiutaga vivo estas la sola kondiĉo por la movadon antaŭenigi en nia kontinento.

**[D] ARE estas salutinda kaj kuraĝiginda iniciato. Ankoraŭfoje, dankon pro viaj respondoj kaj bonan sukceson al vi kaj al Esperanto en Madagaskaro.**

[R] Mi esperas, ke ARE inspiros aliajn samkontinentanojn starigi similajn aŭ eĉ krei pli interesajn projektojn por prefere progresigi Esperanton en nia kontinento ol daŭre fermiĝi en senfinaj kvereloj pri estraraneco kaj k.s. Mi deziras sukceson ankaŭ al via redaktoreca laboro.

Intervjuis Adjévi Adjé
Revuo Babilanto, n-ro 15